

Plena Ilustrita Vortaro
de
Esperanto

DUA ELDONO PER "OFFSET"

Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto

DUA ELDONO PER "OFFSET"

1977

SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

67 Avenue Gambetta,

PARIS - 20

DEDIĈITA
AL LA MEMORO
DE LA DU GRANDAJ ESPERANTISTOJ

EŬGENO LANTI
kiu iniciatis

EMILO GROSJEAN-MAUPIN
kiu efektivigis

LA "PLENAN VORTARON"
prototipon de ĉi tiu verko

*Ĉiuj rajtoj rezervitaj por ĉiuj landoj
inkluzive de Sovetio*

© S.A.T. 1970

PLENA ILUSTRITA VORTARO
DE ESPERANTO

AVERTO DE LA ELDONANTO

Tiu ĉi dua eldono estas la reprodukto, laŭ foto-procedo, de la unua. Ni ja scias, ke tiu unua entenas kelkajn erarojn, tipografiajn aŭ alispecajn. Ni agnoskas, ke la plej bona solvo estus rekomposti ian duan eldonon, kiu estus pli proksima al la perfekteco; sed ni rezignis, almenaŭ provizore, pro jenaj motivoj:

1. Rekomposti PIV sur bazo de nova manuskripto atingus koston, kiu tute ne kongruus kun la nunaj ekonomiaj cirkonstancoj.

2. La nura preparado de nova manuskripto daŭrus plurajn jarojn pro la longa detaleca diskutado inter fakuloj per poŝta korespondado, dum, jam en ĉi tiu jaro 1976, estos baldaŭ elĉerpita la unua eldono de 1970.

3. Aliflanke, la aldono aŭ aparta depreso de suplemento entenanta nur korektojn kaj ĝustigojn prezentus du gravajn malavantaĝojn: ĝi altigus la jam konsiderinde altan prezon de la libro, kaj ĝi postulus de la uzonto tiel tedan laboron de referenca transskribado, ke por la plimulto ĝi fariĝus senutila balasto. Tamen la utiligado de la finaj 4 blankaj paĝoj, destinitaj al "notoj", ebligis al ni, sen troa kosto, fari paŝeton al pliĝustigo de kelkaj tekstopecoj; kompreneble, pro la limigita spaco, ni povis korekti nur la erarojn, presajn aŭ redaktajn, kiuj tuŝas unu solan vorton. Same ni petis de S-ino Stop-Bowitz la kompletigon de la Plato XXII. Tiaj estas la solaj plibonigoj, kiujn ni permesis al ni, ĉar ili ne riskis endanĝerigi nian budĝeton aŭ prokrasti la liveradon de ĉi tiu reeldono.

S.A.T. (eldonanto)

Parizo 1977

III. Teknikoj kaj Sciencoj de la materio

Direktanto:

R. Haferkorn, *Diplomita Inĝeniero, emerita Supera Poŝtkonsilisto pri Telekomunikoj, Direktoro de la Sekcio "Teknika Vortaro" en la Akademio*

ASTRONOMIO D-ro V. Happach

AŬTOMOBILoj M. Jaumotte; H. Boffejon

AVIADILoj E. D. Durrant

ELEKTRO †Prof. R. Mesny

ELEKTROTEKNIKO D-ro Inĝ. A. Warner; Dipl. Inĝ. S. Alexandersson; Mag. Inĝ. K. Siwicki; R. Haferkorn

FERVOJOJ E. M. Rosher; G. Ritterspach

FIZIKO †Prof. D-ro H. Sirk; D-ro F. J. Belinfante, *Universitata Prof. en West-Lafayette*

FOTOGRAFIO, OPTIKO V. Setälä, *Akademiano*

GEOLOGIO, MINERALOGIO †H. Rosendahl, *Kuratorio de la Geologia Muzeo en Oslo*; R. Gérard, *emerita prof. en Parizo*

KEMIO D-ro W. J. Nijveld, *Inĝ. pri farbindustrio en Amsterdamo*

KONSTRUTEKNIKOJ Inĝ. K. J. Moberg; Inĝ. A. Broise, *Korespondanto de la Akademio*; E. Werner; Dipl. Arkitekto L. A. Dernoï

MARAFAEROJ, ŜIPOJ Komandanto P. Clissold; Kapitano Magnus Kluve

MAŜINOJ Inĝ. F. Charlet

MATEMATIKO, GEOMETRIO †C. Rogister; Prof. P. H. Mooij; D-ro O. Reiersøl, *Universitata Prof. en Oslo*

METELOGIO M. Lewin

METIOJ E. M. Rosher

RADIOFONIO A. Venture

STATISTIKO O. Reiersøl

TEKSAFAEROJ M. kaj V. Verda; s-ino Bartovská

TELEKOMUNIKOJ †Inĝ. J. R. G. Isbrucker; R. Haferkorn; A. Warner

REDAKCIO

ĈEFREDAKTORO G. Waringhien

SEKRETARIO A. Caubel

ILUSTRADO (*elektio de la bildoj*) Komitato de S.A.T.; (*desegnado*) S-ino E. Støp-Bowitz

REVIZIO KAJ KOREKTADO DE LA PRESPROVAĴOJ A. Albault, R. Bernard, A. Caubel, F. Baronnet, J. Thierry, G. Waringhien

ADMINISTRACIO

L. Bannier, *Prezidanto de S.A.T.*

ĜENERALA ANTAŬPAROLO

I. HISTORIO DE TIU ĈI VORTARO

Kiam, en Decembro 1927, Lanti konvinkis Grosjean-Maupin, tiaman Direktoron de la Akademia Sekcio pri la “Komuna Vortaro”, entrepreni revizion, modernigon kaj ampleksigon de la elĉerpita “Vortaro de Esperanto” de Kabe, ili antaŭ ĉio akordiĝis pri la karaktero de la nova verko: ĝi estu oportuna, praktika gvidilo por la ordinaraj esperantistoj; ne gravas, diris Lanti, ĉu tia gvidilo ne estos absolute perfekta: la ĉefa afero estas, ke ĝi ekzistu, ke oni ĝin vaste uzadu, kaj ke el tiu uzado rezultu la unueciĝo de la komuna lingvo. Ili tute ne volis doni erudician, historian monumenton, kiel ekz. la tiam laŭkajere aperanta “Enciklopedia Vortaro” de E. Wüster. Grosjean-Maupin tion klare difinis en sia antaŭparolo: “Servi ne nur al tiuj, kiuj deziras ĝuste kompreni ĉiujn esprimojn kaj nuancojn de Esperanta teksto, sed ankaŭ al tiuj, kiuj volas korekte kaj bonstile verki ion en Esperanto”. Por tion atingi, la plej taŭga rimedo estis la citado de ekzemploj, kiuj estu klaraj, mallongaj kaj aŭtoritataj; kiam tiuj tri ecoj ne akordiĝis, Grosjean-Maupin ne hezitis mallongigi aŭ simpligi malĉefajn frazopartojn, markante tamen la ekzemplon per la signo de la aŭtoro, de kiu ni ĝin pruntis, tiel ke ofte estis plene aŭtenta nur la ekzemplodona parto de la frazo.

La laboron devis principe fari poduone A. Esselin kaj mi, utiligante la abundan sliparon, jam de jaroj kolektitan de Grosjean-Maupin, kaj aldonante nian propran materialon; li mem devis korekti, revizii kaj kompletigi tiun unuan redaktaĵon. Sed tre baldaŭ Esselin, kiu cetere ne havis leksikologian trejnitecon, grave malsaniĝis, kaj Grosjean-Maupin devis preni sur sin la restantan parton de la laboro antaŭe difinita al li (i.a. la literojn R, S, Ŝ kaj T), dum mi devis aparte redakti la gramatikan kaj vortfaradan parton (afiksoj, prepozicioj, konjunkcioj, subjunkcioj kc).

Al tiu komunlingva vortaro Lanti decidis aldoni nombron da teknikaj terminoj, kaj por tio li turnis sin al S. Grenkamp-Kornfeld: ĉi tiu, sur la bazo de la “Enciklopedia Vortareto” de Ch. Vérax (1910), kaj kun la helpo de kelkaj okazaj kunlaborantoj, faris konsiderindan taskon; sed, estante mem nur ĵurnalisto, li ne havis la necesan kompetentecon por kribri, ekvilibrigi kaj eĉ redakti tian malfacilan diversfakan materialon. La plej — kaj eble la sola — bone traktita fako estis la “historia materialismo”, kiun prizorgis la konata specialisto L. Laurat.

Fine oni devas ne forgesi la rolon de Lanti mem, kiu seninterrompe helpadis kaj konsiladis en tia senprecedenta entrepreno, solvante kun saĝa takto la teknikajn problemojn de la presado same kiel la personajn malfacilaĵojn, kiuj okaze leviĝis inter la redaktantoj de la komunlingva parto kaj tiu de la teknika parto.

La tiel kompilita vortaro, aperinta en Oktobro 1930, malgraŭ la neeviteblaj mankoj kaj difektoj, montriĝis tiel taŭga kaj bezonata, ke jam en la samjara Decembro Lanti planis duan eldonon, en kiu la teknika terminaro prezentus

apartan volumon. Sed la distribuo de la vortoj inter tiuj du partoj montriĝis tro malfacila, kaj oni decidis konservi la formulon de la unua eldono. Cetere Grenkamp-Kornfeld preskaŭ nenion ŝanĝis en sia kontribuo. Male la komunlingva parto grave pliriĉiĝis de la senĉesa kolektado de tipaj ekzemploj, kiun faradis Grosjean-Maupin kaj mi, kaj de la pli nuancitaj difinoj de pluraj sencokompleksaj radikoj. La nova eldono aperis en Julio 1934, ĉirkaŭ ses monatojn post la morto de Grosjean-Maupin; ĝi entenis 7004 artikolojn — nur ĉirkaŭ 200 plie ol la unua — sed la enhavo de multaj el ili konsiderinde kreskis.

Tia, kia ĝi estis en sia dua eldono, la P.V. efektive plenumis la intencitan rolon de fiksanto de la lingvo kaj de diskreta konsilanto de la uzantoj. Komence atakita de kelkaj “ĝisostuloj”, ĝia aŭtoritato fariĝis iom post iom ĝenerale rekonita. Plie: pro la nefiniĝo de la Wüster “Enciklopedia Vortaro” kaj la nepublikigo de la “Zamenhofa Konkordanco” aranĝita de W. Bailey, multaj trudis al ĝi la rolon de lingv-historia vortaro, kiun ĝi neniam pretendis. Tiel ke, en la jaroj sekvintaj la duan mondmiliton, mi, kiu restis la sola el la komenca kvaropo, devis konsideri du ampleksajn kontroladojn, unue de ĉiuj aŭtorsignitaj ekzemploj, due de la tuta teknika parto.

Sed en tiu tempo Lanti kavis pli aŭdacan projekton: li volis, ke P.V. fariĝu ia ilustrita enciklopedio, analoga al la franca “Petit Larousse Illustré”. Lia instigo (apogita de listo da vortoj kaj ekzemploj, kiujn li mem kolektis el la “Malnova Testamento” tradukita de Zamenhof) kaj la traesploro de la granda “Japan-Esperanta Vortaro” de Okamoto (kio estis mia unua esperantista laboro de post mia liberigo, en 1945), kuraĝigis min entrepreni fundan revizion de la P.V., kun aldono i.a. de la propraj nomoj historiaj kaj geografiaj, kaj kun la starigo de scienca terminaro komisiita al specialistoj, kiuj funde povoscius nian lingvon. La fortuno tiam renkontigis al mi tri tiajn idealajn kunlaborantojn, P. Neergaard, C. Støp-Bowitz kaj W. J. Nijveld, kies kontribuoj resp. pri la botaniko, la zoologio kaj la kemio prezentis modelojn de scienca metodo kaj de leksikologia lerteco.

Ĉar la cirkonstancoj ne favoris en tiu tempo la eldonon de granda vortaro, mi decidis uzi la jam akiritan materialon en iu Esperanta-franca vortaro, kiu estus k... aŭ la ĝenerala provado de la P.I.V. rilate la nombron de la radikoj, la difinojn de la sencoj, kaj la strukturon de la tuta verko. La “Grand Dictionnaire” estis verkita inter Januaro 1951 kaj Februaro 1956, kun sesmonata interrompo ŝuldata al okul-operacio; ĝi aperis en Oktobro 1957. Intertempe laŭ interkonsento kun L. Bannier, kiu prudentoplene anstataŭis la karmemoran Lanti, mi aranĝis 64-paĝan “Suplementon” al la P.V., kompilitan inter Februaro kaj Novembro 1953 kaj aperintan en Junio 1954, kun 966 artikoloj. La redaktado de tiuj du verkoj evidentigis la neebulon daŭrigi sola tiel ampleksan laboron: feliĉe por mi kaj por la P.I.V., mi tiam trovis en D-ro A. Albault la tiel bezonatan specialiston pri medicino kaj en lia duobla kompetenteco, esperantologa kaj fakvortarista, plej valoran helpon; aliflanke R. Haferkorn, kiu jam de dek jaroj okupiĝis pri teknikaj terminaroj kaj ĵus aperigis kun K. Dellian “Sciencan kaj Teknikan Terminaron”,

konsentis en Oktobro 1956 fariĝi la Direktanto de tiu parto en la P.I.V.; kaj lia elektiĝo, la sekvantan jaron, al la Direktoreco de la Sekcio "Teknika Vortaro" de la Akademio povis nur faciligi lian penplenan taskon varbi kunlaborantojn por la plej gravaj fakoj, ordigi ties kontribuojn kaj kontroli aŭ harmoniigi ilin.

Fine, en la komenco de 1960 R. Haferkorn disponigis al mi la rezulton de sia laborado, sub formo de ampleksa sliparo, kaj tuj en Aprilo 1960 mi komencis la redaktadon de la manuskripto de la P.I.V., kiu daŭris ĝis Marto 1965. La manuskripto kovris 1297 paĝojn en densa tajpado, sed ĝi ankoraŭ ne entenis la nemodifitajn artikolojn de la P.V. nek la slipojn liveritajn de Haferkorn kaj de aliaj kunlaborantoj. Kunfandi la tuton en unu solan, koheran manuskripton kaj fari el ĝi kvar ekzemplerojn estis la komplika, atentostreĉa kaj pezega tasko, kiun A. Caubel plenumis inter Junio 1960 kaj Februaro 1966, profitigante krome la komunan verkon per siaj sagacaj rimarkigoj. La definitiva manuskripto ampleksis 3285 paĝojn en maldensa tajpado, kaj la tuta vortaro entenis ĉirkaŭ 15 250 artikolojn. Sed ĝis la ekspresigado kaj eĉ dum la kompostado, mi ne ĉesis enmeti diversajn kompletigojn aŭ korektojn, kiujn mi aparte pruntis el la spertoplenaj proponoj de D-ro Albault, la nuna Direktoro de la Akademia Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro. Vortaro estas io sama kiel mastrumado — la tasko neniam estas finita.

Se tiel granda kaj grava verko sukcesis vidi la lumon, tion oni ŝuldas kaj al la kuraĝa iniciatemo de la Plenum-Komitato de S.A.T. kaj al la sindediĉo de ĝia Prezidanto L. Bannier, kiu nenion ŝparis por trovi la plej taŭgan kaj fidindan presejon, kaj prenis sur sin ne nur la aranĝon de la tuta eldonplano, sed ankaŭ la financon respondecon de tiu timiga entrepreno — fine al la malavara subtenado de multaj fervoraj esperantistoj, el kiuj kelkaj oferis eĉ el sia propra necesajo por certigi la efektiviĝon de la P.I.V. Nur dank' al la penoj de tiuj anonimaj, sed aŭtentaj disĉiploj de Zamenhof kaj de Lanti kroniĝis la kolektiva laboro de tiom da jaroj.

II. CELO KAJ METODO

La idealo de bona vortaro estas respeguli la lingvon uzatan en unu pli-malpli vasta medio kaj en unu pli-malpli limigita tempo. Tio supozigas la konsideradon de du serioj da faktoj: unue la elementoj, kiuj estas herede trudataj de la tradicio (formo de la vortoj, ilia baza senco, iliaj derivaĵoj aŭ kunmetaĵoj, la reguloj, laŭ kiuj ili aranĝiĝas en frazojn); due la elementoj, kiuj variadas laŭ la homgrupoj, la epokoj kaj la verkistoj (la dirmanieroj proverbiaj aŭ metaforaj, la arkaismoj kaj neologismoj, la stilo ktp). Krome al tiu registrado aldoniĝas ofte, konfesata aŭ ne, ia normiga intenco, ĉar eĉ la sola elektado inter la sennombraj eblaĵoj de la parolo estas per si mem esprimo de juĝo kaj deziro influadi la uzantojn.

Kiam temas pri lingvo internacia — kaj sennacia — kiel Esperanto, la kondiĉoj estas, kvankam multe pli kompleksaj, esence la samaj. La herede trudatajn elementojn liveras la "Fundamento", kaj la ceterajn elementojn la

uzado de la bonaj verkistoj, ĉar, en tia okazo, pro la malofteco de multaj kaj daŭraj renkontiĝoj inter la esperantistoj, la uzadon montras kaj elvolvas precipe la skriba lingvo kaj de la gazetoj kaj de la libroj. Tiel mia tasko, preparita de kaj apogita sur la verko de Grosjean-Maupin estis duobla: unue prezenti kiel eble plej fidele la donitaĵojn de la “Fundamento”, due esplori plej zorge la postan literaturon kaj prezenti pri ĝi plej kompletan bildon. Nur el tiu duobla klopodo tia verko, kia estas jena, povas atingi sian esencan celon, registri la akiritajn kiel sekuran deirejon al plua elvolvigado. Ĉar lingvo povas evolui kaj pliriĉiĝadi sen danĝero por sia unueco kaj stabileco nur, se ekzistas, de ĉiuj konata kaj al ĉiuj facile alirebla, firma bazo el klare difinitaj vortoj, komune fiksigitaj kunmetaĵoj, rutine uzataj dirmanieroj kaj ĝenerale akceptitaj metaforoj; tio klarigas, kial mi penis kolekti plej grandan nombron da ekzemploj tiom el la klasikaj verkoj, kiom el la ĉiutagaj konversacioj, kaj donis grandan spacon al la senc-esploro de la plej uzataj radikoj.

A. La Fundamento

Principe mi tenis min ĉe skrupula respekto de tiu unika dokumento. Interalie mi ĉiuloke konservis la gramatikan kategorion, en kiu la radikoj aperas en la “Universala Vortaro”: kvankam pri kelkaj el ili oni povas dubi, ĉu alia kategorio ne pli bone akordus kun la uzataj derivaĵoj kaj kunmetaĵoj, mi ne arogis al mi fari tranĉan decidon pri demando, kiun la Akademio sola rajtas kaj kapablas solvi post serioza diskutado. Cetere la mencio, en kelkaj artikoloj de tiu U.V., de apartaj kunfinaj formoj apud la senfinaja ĉefradiko (ekz. *flor’o* apud la verba *flor’*) montras, ke en la spirito de Zamenhof la kategorieco de la radikoj estis pli elasta, ol oni ordinare opinias.

Mi same konservis la formojn kun *ĥ*, kvankam en pluraj okazoj (ekz. *ĥemio*, *meĥanismo*) la nuna uzado pli kaj pli decideme preferas la formojn kun *k*. Pri la grupo *rh* (*arĥitekturo*, *monarĥo*), neprononcebla por multaj homoj, la plimulto de la Akademio aprobis, en Junio 1921, la proponon de Grosjean-Maupin, “laŭvole anstataŭigi la literon *ĥ* per la litero *k* en la okazoj, kiam ĝi senpere sekvas post la litero *r*”, kaj tiun decidon mi simple aplikis.

Ĉiuj radikoj de la Fundamento kaj la kunmetaĵoj de la U.V. estas ĉi tie signitaj per antaŭa asterisko; ilia listo diferencas iom de tiuj, kiujn oni trovis en la “Suplemento de P.V.” aŭ en mia “Grand Dictionnaire”: la kaŭzo estas, ke en Julio 1956 la Akademio decidis, ke oni rigardu kiel fundamentajn la radikojn entenatajn en iu ajn parto de la “Fundamento”. Tiele 95 radikoj komunuzaj kaj 35 propraj nomoj devas nun ricevi la signon de la fundamenteco (el ili nur 59 estis jam oficialigitaj).

La zorga kontrolado de la kvinlingvaj tradukoj en la U.V., de la tradukoj en la rusaj kaj germanaj vortaroj de Zamenhof kaj de la francaj tradukoj en la vortaro de Beaufront el la “Kolekto Aprobata” — kontrolado, kiun faciligis la esploroj de A. Albault — evidentigis plurajn deflankiĝojn en la difinoj aŭ tradukoj kutime prezentitaj: kelkaj inter ili (ekz. ĉe *ĉikani*) estis sankciitaj de la uzado, pri la ceteraj reveno al la fontoj ŝajnis konsilinda: en ambaŭ okazoj registrado de tiuj sencoŝanĝoj estis necesa.

Rilate la gramatikajn instruojn de la “Fundamento”, mi ilin esploris kun la sama skrupulo; kaj mi estis aparte feliĉa, ke pri unu longe diskutita punkto, t.e. la pasiva konjugacio, la Akademio oficiale sankciis mian interpretadon. Por la kompletigo de tiuj instruoj mi helpis al mi per la “Lingvaj Respondoj”, de kiuj mi donis en 1962 riĉigitan kaj pli korektan eldonon, kaj per la “Plena Gramatiko”, en kies tria eldono (1958–1964) nia plej sperta filologo K. Kalocsay enmetis la esencon de sia sciado kaj klereco.

La klasifikado de la verboj inter “transitivaj” kaj “netransitivaj” prezentas iajn malfacilaĵojn pro la elasteco de uzado de la akuzativo en nia lingvo. Grosjean-Maupin eĉ elpensis, en la dua eldono de la P.V., apartan signon (x), por montri, ke verbo povas esti aŭ transitiva aŭ netransitiva. Mi opinias, ke pli bone estas analizi ĉe ĉiu verbo, ĉu unu senco donas transitivecan, alia netransitivecan karakteron al la radikoj. Ĉar la regulo, ofte malĝuste formulita, estas, ke en Esperanto unu sama verbo ne povas esti samtempe transitiva kaj netransitiva, *konsevante precize la saman senco*: ekz. oni ne povas uzi *komenci* anstataŭ *komenciĝi*, ĉar en ambaŭ okazoj temas pri la sama procezo; male, inter “li batas sian hundon” kaj “la tamburoj batis”, temas evidente pri du malsamaj nocioj.

B. La posta literaturo

Ekde 1908 la Lingva Komitato kaj poste la Akademio publikigis listojn de vortoj komune uzataj aŭ internacie konataj, kiujn ĝi deklaris oficiale akceptitaj, tiele fiksante ilian formon kaj senco. Ĉiuj radikoj entenataj en tiuj sep ĝis nun aperintaj “Oficialaj Aldonoj al la U.V.” estis kontrolitaj kaj registritaj; tamen ĉiuj el ili, kiuj troviĝis en la ceteraj partoj de la “Fundamento” kaj estas nun rigardataj kiel fundamentaj, ne plu estas montritaj kiel oficialaj; fine mi konsideris ankaŭ la lastajn decidojn de la Akademio¹, i.a. pri la senoficialigo de “koncentra”.

Sed lingvo estas multe pli ol nura kolekto da radikoj, kaj ĝi vivas nur en la homa parolo, kiun oni povas kontroli precipe en la skribaj dokumentoj. Antaŭ ĉio estis do atentindaj la prozaj verkoj, kaj unuarange tiuj de Zamenhof, pri kiu la “Bulona Deklaracio” diras, ke “pro plena unueco de la lingvo al ĉiuj esperantistoj estas rekomendate imitadi kiel eble plej multe tiun stilon, kiu troviĝas en la verkoj de la kreinto de Esperanto”, ĉar li “plej bone konas la spirito” de tiu lingvo. Mi do relegadis, kun la kradono en la mano, ĉiujn liajn verkojn, precipe esplorante tiujn, kiuj estis publikigitaj post la dua eldono de la P.V. en 1934, i.a. la du volumojn de liaj “Leteroj”, kies eldonon mi provizis, la 4an volumon de lia traduko de la “Fabeloj” de Andersen (kies presprovaĵojn bonvolis frue komuniki al mi la eldonistoj), kaj la pecojn, lastatempe editoritajn de R. Hauptenthal kun rimarkinda diligento.

Mi provis doni la liston de ĉiuj radikoj uzitaj de Zamenhof; tamen, ĉar ĉi tiu verko ne celas esti erudicia leksikono, mi observis kelkajn limigojn: mi ne konsideris tiujn vortojn el la “Fundamenta Krestomatio” aŭ el la

¹ Vd “Aktoj de la Akademio”, 1968, p. 73.

“Esperantisto”, kiuj troviĝis en pecoj ne subskribitaj de nia aŭtoro mem. Mi rezignis pri kelkaj arkaismoj, troveblaj nur unu fojon ĉe li, kaj pri multaj senfamaj nomoj el la Bibliaj tribetoj aŭ vilaĝetoj. Aliflanke, ĉar mi principe uzadis la finaĵon *a* ĉe la virinaj nomoj, mi ne opiniis min rajtigita surmeti la signon de zamenhofeco al tiuj, kiujn li uzis kun la finaĵo *o*. Fine, kiam en unu artikolo mi liveras zamenhofan ekzemplon, mi preterlasis ĉe la frontradiko indiki ĝian zamenhofecon.

Pri la zamenhofaj kunmetaĵoj, mi multe uzis la altvaloran, kvankam nun ne plu kompletan, kompilon de Prof. N. Kawasaki: “Kunmetitaj Vortoj el Zamenhofaj Verkoj” (Osaka, 1949).

Multajn citaĵojn, parte kripligitajn en la P.V., mi reĝustigis, i.a. kun la helpo de W. Bailey kaj de A. Caubel, kaj mi penadis aldoni al ili novajn, kiel eble plej trafajn.

Aparte la Zamenhofa traduko de la hebrea Biblio montriĝis abunda fonto da tipaj esprimoj, sentencoj aŭ metaforoj, kiuj estas pli-malpli jam internacie uzataj kaj sekve devis trovi sian lokon en ĉi tiu inventaro. Sed ĉi tie leviĝis la malfacilo, ke el la traduko farita de Zamenhof, kvankam ĝi ankoraŭ ekzistas manuskripte, estis publikigitaj nur ok libroj en la eldono “Hachette”; por la ceteraj ni posedas nur la tekston reviziitan de “Biblia Komitato”, konsistanta el Britaj pastroj kaj akademianoj. Kiel ajn respektama estis ilia revizio, oni ne povas meti ĝin sur la saman nivelon, kiel la ceteran verkaron de Zamenhof, des pli ke la aŭtoro mem tion rifuzis, laŭ ĵus publikigita letero al Bolingbroke Mudie: “Al pastro Rust mi donas plenan rajton fari en mia traduko ĉiujn ŝanĝojn, kiujn li trovos necesaj aŭ utilaj, sed kun la kondiĉo, ke tio estu farata ne sub mia nomo” (23.I.1914 — tiu kondiĉo ja ne estis observita). Aliflanke la libroj eldonitaj de “Hachette” interesas nur la erudiciulojn, kaj la granda publiko konas kaj uzas nur la Londonan tekston de la Biblio. Tial mi decidis marki la citaĵojn el tiu Malnova Testamento per aparta signo (^X), kiu tuj avertas la leganton kaj pri la tipa karaktero de la lingvo aŭ de la stilo kaj pri la ne tute certa zamenhofeco de la frazo. La citaĵoj el la Nova Testamento, el kiu bedaŭrinde nur la unua Evangelio estis stile adaptita al la Malnova, ricevis alian distingan signon (^N).

Apud Zamenhof alia aŭtoro, K. Bein (ofte sub sia pseŭdonimo “Kabe”), kiun la 4a Universala Kongreso elektis kiel “la unuan stiliston Esperantistan”, multe kontribuis per siaj klasikaj tradukoj, inter kiuj elstaras “La Faraono”, kaj per sia tut-esperanta vortaro al la fiksado kaj riĉigado de la lingvo: ilin ankaŭ mi zorge relegadis kaj ekspluatis.

Bazon de nia poezia lingvo prezentas la verkoj de A. Grabowski kaj de K. Kalocsay, kaj ilin mi konsciencie esploris; sed ankaŭ la sekvinta florado de nia poezio estis registrinda. Tiucele mi kontrolis ĉirkaŭ 30 poeziajn aŭ artprozajn verkojn el la plej talentaj aŭtoroj, kaj mi esperas, ke tiu parto de mia laboro ne restos senutila, ĉar neniuj vortaro, precipe de juna lingvo, estus inda je sia rolo, se ĝi ne ebligus la plenan alireblecon de tia literaturo. Sed literaturo estas io, alio estas la komunuza lingvo: tial ĉiun el la tiel kolektitaj novaj vortoj mi markis per aparta signo (^Ŭ), kiu avertas la leganton, ke ĝi

ne estas uzebla en la ordinara parolo aŭ skribo. Neniu prudenta homo uzus en laika konversacio *amaŭrozo* anstataŭ *blindeco* aŭ *gastropodo* anstataŭ *limako*: oni same ne uzu *folo* aŭ *linda* anstataŭ *frenezeta* aŭ *beleta* ekster la propra beletra tereno.

Restis la lingvo de la ĉiutaga vivo, ne nur de la viroj, sed ankaŭ de la virinoj kaj de la infanoj, ne nur en Eŭropo, sed ankaŭ ekster tiu malgranda promontoro de la kolosa Azio. Ĉi tie min multe helpis la korespondado kun miaj kolegoj M. C. Butler kaj St. La Colla, kiuj proponis plurajn taŭgajn nomojn por la diversaj uzaĵoj de la familia vivo; pri la orientaj landoj mi profitis el la kontribuo, kiun mia kolego N. Kawasaki afable disponigis al mi, el la “Japana Enciklopedieto” de T. Nakamura, el la tradukoj de ĉinaj aŭtoroj, precipe la “Ĉina Antologio” kaj la “Noveloj de Lusin”; sed plej konstanta fonto de utilaj tiurilataj informoj estis la diverslandaj gazetoj, el kiuj la pli malgrandaj ne ĉiam estis la malpli fruktodonaj. El tiu stoko da vortoj kaj esprimoj, kies deficiton ni sentas je ĉiu paŝo en la ordinara vivo, mi distingis per aparta signo (⊙) la nove enkondukitajn radikojn, ke oni ne uzu ilin blinde aŭ tro abunde: se ili estas allaseblaj en tekstoj destinitaj al jam sperta publiko, ili nepre neniam devus trovi lokon en lerno- aŭ legolibroj; en la gazetoj oni almenaŭ klarigu ties sencon; kaj pri ilia uzado oni ĉiam memoru la saĝan konsilon de Zamenhof: “Ne tro multe, ne tro krude per unu fojo!”.

Du finaj rimarkoj: 1 Ekzistas en nia lingvo kelka nombro da duoblaj formoj: unuj venas de la normala disvolviĝo de la lingvo, kiu, avara je radikoj en la komencaj jaroj el propaganda motivo, emis poste diferencigi en novajn vortojn iajn primitive nedistingitajn nuancojn (ekz. *arbedo*, *arbusto* kaj *vepro* precizigis la signifojn miksitajn en la sola *arbeto*); aliajn prezentas vortoj provizitaj per internaciaj sufiksoj, kiuj eniris en la lingvon laŭ la 15a regulo de la “Fundamenta Gramatiko”, sed estis iom post iom anstataŭataj de pure Esperantaj derivaĵoj (ekz. *deklaro* substituiĝas al *deklaracio*, *iniciato* al *iniciativo*)¹; kelkaj vortoj elmodiĝis, forpelitaj de pli taŭgaj formoj, sed, ĉar ili siatempe estis uzitaj de Zamenhof, ili rajtas konservi mension (ekz. *eskadrono* apud *skadro*); fine, por kelkaj ne oftaj nocioj, du formoj estis diversflanke proponitaj kaj neniu ĝis nun nete triumfis super la alia (ekz. *gazono* apud *razeno*). En ĉiuj tiaj okazoj mi enmetis la formon arkaikan aŭ maloftan kaj mi redirektis la leganton per la signo “=” al tiu, kiun mi rigardas preferinda, aŭ kiu troviĝas pli ordinare en la komuna lingvo.

2 Inverse, okazas iafaĵe, ke du apartaj nocioj ricevas unu saman vortoformon; sed tiujn esceptajn okazojn mi ne ĉiam sammaniere traktis.

a) Kiam ĉiu el tia paro da homonimoj estas teknika termino kaj ke iliaj kampoj de uzado estas sufiĉe malproksimaj, oni povas toleri ilian kunekz-

¹ Mi tamen ne ĉiam cedis al tiu tendenco, precipe ĉe la teknikaj vortoj; ĉe ili mi principe tenis min al la internaciaj formoj kun pseŭdosufiksoj, ĉar ili estas pli facile rekoneblaj unuavide de la ne-esperantistoj — kio en la faka literaturo estas io grava kaj konsiderinda — kaj eĉ al la esperantistoj ĝi evitigas okazojn de vortkonfuzo (*dekor*o povus analizigi al *de-koro*, *dek-oro* ktp, dum *dekoracio* estas tute klara). Mi opinias efektive, ke unu el la danĝeroj, kiuj minacas nian movadon, estas la esotereco de sekto refermiganta sur sin mem, kaj sisteme rifuzanta la influojn de la ekstera mondo.

istadon, kvankam ĝi malobservas fundamentan principon de nia lingvo. Ekz. ne gravas, ke *enanto* nomas jen herbon, jen birdon, aŭ ke *manao* havas jen biblian, jen farmacian, jen etnologian sencon. Ĉe tiuspecaj homonimoj mi kunigis iliajn diversajn signifojn en unu sola artikolo, eĉ kiam ili respondas al diversoriginaj vortoj; ekz. oni trovas sub unu sola frontradiko la du sencojn de *rumbo*, kvankam la unua devenas, tra la angla, el la greka *rhombos*, kaj la dua devenas, tra la hispana, el Afrika dialekto. Tio povos eble ŝoki la erudiciulojn, sed oni memoru, ke neniam estis en la plano de la P.I.V. fariĝi etimologia vortaro, aŭ, kiel oni diras en la hodiaŭa jargono, prezenti diakronan analizon de la semantika kampo en diskretajn unuojn. Kompreneble, kiam unu el la du homonimoj estas fundamenta aŭ oficiala vorto, aŭ propra nomo, mi pritraktis ilin en du apartaj artikoloj.

b) Male, kiam unu el tiuj duopaj homonimoj estas komunuza vorto, mi opiniis necesa liveri rimedon de distingo, eĉ se nur por la okulo. Jen kial pri la hebreaĵ mezurunuoj mi preferis al la simpla, konfuzodona formo de Zamenhof, la apostrofmarkitan formon de la Londona Biblio (ekz. *bat'o*, *log'o*). Jen kial, pri kelkaj aliaj vortoj, mi preferis, laŭ la modelo de la internacia, zamenhofa kaj oficiala *budĝeto*, intermeti superfluan konsonanton (ekz. *matĉo*, *pitĉo*). Jen kial mi konservis ĉe aliaj vortoj la duoblan konsonanton de Zamenhof (ekz. *brutte*, *villo*). Tiu agmaniero verŝajne ĉagrenos bonajn esperantistojn, kiuj rigardas nepre fonetikan ortografion esenca trajto de nia lingvo; sed longa sperto instruis al mi, ke la lingvaj aferoj ne estas submetebaj al reguleco absoluta, kaj mi konsideris, ke en tiuj maloftaj okazoj la uzo de internacia kaj pli klara ortografio havas pli da avantaĝoj ol da ĝenoj. Oni devas neniam forgesi, ke Esperanto estas, en la 90% el la okazoj, lingvo nur legata, kaj ke la facila rekonebleco de la vortoj estas por tia lingvo almenaŭ tiel bezonata necesaĵo, kiel la fonetika skribo. Oferti unu aŭ la alian el tiuj du principoj estas afero de takto, de saĝo kaj de oportuneco.

* * * *

Mian ampleksan kaj kompleksan programon mi ne estus povinta plenumi sen la konsultado de la antaŭaj leksikologiaj verkoj (el la lastatempaj mi citu almenaŭ la bulgarajn de A. Atanasov, D. Simeonov k.a., la hungarajn de A. Pechan, la japanajn de Nukina-Miyamoto kaj de Mijake, la rusan de E. Bokarev, la germanajn de H. Wingen — la anglajn de M. C. Butler kaj de J. Wells mi povis profiti nur dum la korektado de la presprovaĵoj), kaj sen la bonvola helpado de multaj amikoj kaj korespondantoj, kies nombro estas tro granda, por ke mi povu pagi laŭnome la alprenitan ŝuldon; almenaŭ mi salutu du forpasintajn akademianojn, St. La Colla, la spertulon pri la enciklopediaj entreprenoj, kaj Porto Carreiro Neto, la senkomparan konanton de la zamenhofa lingvo.

C. La propraj nomoj

Jam de longe multaj uzantoj, kaj inter ili Lanti, esprimis la bedaŭron, ke la P.V. ne entenas proprajn nomojn. Grosjean-Maupin opiniis, ke tio estas tro

malfacila demando, kiun nur “la estonteco solvos, se solvebla”. Tamen la kreskanta literaturo, la oftigo de aviadilaj vojaĝoj kaj la densigo de la internaciaj rilatoj faras tre dezirinda ian solvon, eĉ provizoran kaj neperfektan. Unuan paŝon en tiu direkto mi faris en mia “Grand Dictionnaire”, apogante min sur la sistemo de E. Wüster en lia “Enciklopedia Vortaro” kaj sur la du rimarkindaj apendicoj al la “Nova Vortaro Japano-Esperanta”, en kiujn J. Okamoto kolektis el multaj diversaj fontoj la jam proponitajn formojn de personaj kaj geografiaj nomoj. Nun mi prezentas al la juĝo de la publiko iom pli ampleksan kaj pli koheran liston.

1° El la personnomoj mi konsideris precipe du kategoriojn: la historiajn kaj la individuajn (kiujn estas kutime kvalifiki “antaŭnomoj”, kvankam ĉe pluraj popoloj, ekz. la Japanoj, ili estas ĝuste “postnomoj”). Ĉi tiuj efektive harmoniigas pli facile kun la cetera materialo de la lingvo kaj, eĉ kiam oni ne asimilas la familian nomon, oni volonte uzas nacian formon por la individua: *Mary Stuart* fariĝas franclingve *Marie Stuart*, *Heinrich Heine* — *Henri Heine*; *Louis XIV* estas *Ludwig XIV* por la Germanoj, kaj *Wilhelm II* — *Guillaume II* por la Francoj; la sama sanktulo estas nomata *Francesco* en Italujo, *François* en Francujo kaj *Francis* en Anglujo. Mi konsilus fari same en nia lingvo. Tamen, en la okazoj, kiam la nacilingvaj formoj de unu sama individua nomo forte diverĝas, mi opiniis utila proponi diversajn esperantigojn: oni tiel trovos *Luizo* apud *Ludoviko*, *Gulielmo* apud *Vilhelmo* ktp.

Al la historiaj personnomoj la naciaj lingvoj ordinare konservas ilian originan ortografion, kaj plej ofte same faras la Esperanta uzado, krom pri la antikvaj, kiuj ĝenerale estas asimilitaj. Al tiuj ĉi mi dediĉis la plej grandan parton de la disponebla loko, sekvante, por la transskribo de la helenaj kaj latinaj la detalajn regulojn de Wüster, kun jenaj modifoj, kiuj ŝajnis al mi pravigitaj de la uzado aŭ pravigeblaj de la oportuneco:

a) ĉe la virinnomoj mi sistemigis la finaĵon *-a*, kies uzon proponis K. Kalocsay ekde 1931 kaj kiu de tiam ne ĉesis disvastiĝi;

b) laŭ la ekzemplo de Zamenhof, mi konservis la duoblan konsonanton ĉe la unusilabaj radikoj, kio tre faciligas ilian rekonon (ekz. *Anna*, *Emma* ks kompare kun *Ana* aŭ *Ema*);

c) ankaŭ ĉe la unusilabaj radikoj mi konservis la grekajn finaĵojn *-as* aŭ *-es*, el la sama kaŭzo: *Midaso* estas pli rekonebla ol *Mido*, *Areso* ol *Aro* ks.;

ĉ) en la vortoj finiĝantaj latine per *-ius*, *-ii* aŭ greke per *-ios*, *-iou*, mi konservis la *i* ĉe la antikvaj nomoj kaj forigis ĝin ĉe la respondaj modernaj nomoj: *Plinio* estas pli legebla ol la Wüstera *Pleno*, *Kasio* ol *Kaso*; *Antonion* ni povas tiel distingi de *Antono*, *Julion* de *Julo* ktp.;

d) ĉe la grekaj virinnomoj finiĝantaj per *-o* (*-ous*) mi konservis tiun vokalon, unue ĉar ĝi estis akcentita, do ne simpla finaĵo, due ĉar tio evitigas konfuzojn (ekz. *Eratoa*, *Ioa*, *Inoa* ks).

Por la hebreaj nomoj mi alprenis la formon uzatan en la Londona Biblio, aldonante tamen la latindevenan varianton, kiam ĝi tro diverĝas de la hebrea (ekz. *Ezekielo* apud *Jeĥezkel*).

Por la hindaj nomoj mi helpis min precipe per la tre bona “Leksikologia Komentario”, kiun J. Régulo Pérez aldonis fine de “Nepalo malfermas la pordon”. Tamen unu punkton mi ne povis akcepti, t.e. la konservadon de *h* post konsonanto, kio ŝajnas al mi kontraŭa al la kutimoj de nia lingvo. Kial Esperanto devus malrespekti sian tradician ortografion favore al la Hindoj, dum ĝi rifuzas tion fari por la Hebreoj, Helenoj ktp? Se ni skribas, laŭ Zamenhof, *Prometeo* aŭ *Tiesto*, *Atalja* aŭ *Bat-Ŝeba*, *Arturo* aŭ *Katerina*, lasante fali la *h*, mi ne vidas motivaĵon por ĝin savi ĉe *Amitabho* aŭ *Ĝhanoj*. Sola escepto estas la *Budho*, kiun, post longa hezito, mi preferis al la Zamenhofa *Buddo*, ĉar en tiuj religiaj alnomoj plej grave estas konservi la internacian aspekton, ĉe kiu la *h* estas pli frapa ol la duobla *d*; cetere Zamenhof mem skribis *Kristo* (kaj ne: *Ĥristo*), *Mesio* (kaj ne: *Maŝiaĥ*).

2° Por la geografiaj nomoj de la antikveco, mi gvidis min per la principoj de Wüster en la ĉi-supre citita verko, krom pri tri punktoj: la konservo en la unusilabaj radikoj de la duoblaj konsonantoj (*Kannoj* estas pli rekonebla ol *Kano*), la alprenado de la genitiva radikoj ĉe la neegalsilabaj vortoj finiĝantaj latine per *-s*, *-dis* aŭ greke per *-s*, *-dos* (mi skribas, laŭ Zamenhof, *Aŭlido* ks), kaj la transskribo de la greka finaĵo *-polis* per *-polo* (ekz. *Tripolo*, *Napolo*, analoge al la kurantaj formoj *metropolo* aŭ *nekropolo*).

Pri la modernaj nomoj mi tiris tre grandan profiton el la “Mondmapo”, kiun kompilis la “Internacia Komisiono por ordigo de la geografiaj nomoj” sub la saĝa gvidado de Prof. J. M. Mabesoone. Ĉiujn ĝiajn solvojn mi atente konsideris, kaj nur kun hezito kaj bedaŭro mi en kelkaj okazoj proponis aliajn:

a) respektante la antaŭajn decidojn de la Lingva Komitato, mi ĉie en la teksto mem uzis la sufiksojn *-uj*, krom ĉe la ŝtatoj, kiuj ne prezentas unu solan naciecon (ekz. *Aŭstrio*, *Belgio*, *Ĉeĥoslovakio*, *Jugoslavio*), sed en la nomenklaturado mi regule menciis ankaŭ la sufiksojn *-i*, pro ĝia vasta uzateco kaj ofta oportunecon, precipe en la derivitaj formoj (*Italia* estas pli plaĉa ol *Italuja* ks);

b) same kiel ĉe la aliaj propraj nomoj mi konservis la duoblajn konsonantojn ĉe la unusilabaj radikoj (ekz. *Lasso* anstataŭ *Lasao*);

c) mi restis fidela al la Zamenhofa sistemo distingi per la *i*-sufikso la nomon de urbo aŭ rivero disde landnomo: *Luksemburgo*/*Luksemburgio* estas pli klara kaj plaĉa duopo ol la, cetere pleonasma: *Luksemburgurbo*/*Luksemburgo* ks.

ĉ) pri kelkaj malfacile solveblaj okazoj, mi opinias, ke eblas tiri per retroderivado el la internacia nomo de la loĝantoj pli taŭgan formon por ilia lando: el la A.I. *Congolese*, F. *Congolais*, H. *Congoleño* k.a. oni ricevas tiel *Kongolo* (formon analogan al *Angolo* k.a.), el A. *Israelian*, F. *Israélien* k.a. oni ricevas *Izraelio* ktp.

d) kiam propra nomo de rivero, monto ks estas kunmetita el komunuzaj substantivo kaj adjektivo, mi ordinare lokis la adj-on post la substantivo por, per tia malobservo de la kutima vortordo, faciligi la distingon: mi skribas ekz. *Arbaro Nigra*, *Maro Morta*, *Montoj Rokaj*, kio malebligas la konfuzon kun iu nigra arbaro, aŭ rokaj montoj.